

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

<http://satesperanto.free.fr/> *** retadreso: satesperanto@free.fr



**Vivu 1-a de Majo
tago de laboristaj luktoj!**

Printempo en Zagrebo

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

Majo 2005 76-a jaro, n-ro 5 (1199)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €



El la redaktejo...

Mctcl.

*re" vgo r q" vgt wt g
t cr l f g" r c u c u
ne l" p k e" n a p i t g
u q" g p" \ c i t g d q
r t q m u k o k c u 0
T g u a u" c p v e " p k
k q o " r r k" q n" w p w
o q p c v q 0 k p v g t v g o r g" p k" n a p i a c u e u" n g
v t g" o c r o w a e l" g n' x k' c r k k u' c n' r e" n a p
i t g u a 0 M k g n' f q" p k" n a q o r t g p w" v k p A
L c. " r e" n a p i t g u a" g u a u' r e" u q r e" n a p n q
n k g" p k' r q x c u' r g t u q p g" t g p n a p k k' h e l"
k p v g t c p k' p k e l p" l f g q l p 0' M t q o g" k
g u a u' w p w' g n' r e" r n g l' i t c x c l' l p i a c p e q l"
f g" U C V 0' P w t" r e" t g l g t g p f w o" g u a u
r r k' i t c x c 0' G p" r e" n a p i t g u a" q p k' f g e k
f c u' r t k' r e" g u a p p q' f g' r e" C u q e k q 0' w
x k' g u a u' k p f l g t g p v e l' r t k' k a' O' K' g u r g
t c u' n g' p g 0' F q. l g p' r e" r u a e" o q o g p v q
r q t' f g e l f k k h e l' c r k k e n l r e" n a p i t g u a 0
H e t w' w l' h e l" k u' t g x l f q" g p" \ c i t g d q 0
M e o c t c f g e g' h e l' q r v k o k u o g' x k e*



T g f c m q t a

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj: <http://satesperanto.free.fr>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registriilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39

BIC: PSSTFRPPPAR

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro: Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskripto estas la 10-a de kuranta monato.

□

Imprimé par: EDRB, Avenue Mozart, FR-75016 Paris.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER


Abonnement annuel/jara abono France 55 €.

Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399

Limdato por ricevo de kontribuajtoj estas ĉiam la 10-a en la monato.



S.R. 2005

estas jam preta. Bedaŭrinde vi ricevos ĝin nur post la kongreso, kun la Protokolo pri la kongresaj laboroj. Ni estas devigataj tiel fari pro la postulo de la Preskomisiono pri la kvanto de priasociaj tekstoj. Do kun la septembra numero vi ricevos du suplementojn: Sennacieca Revuo + Protokolo pri kongresaj laboroj.

La Redakcio

78a SAT kongreso aliĝintoj, stato la 15an de aprilo '05:

1. Schram Jakvo, Belgio
2. Stuppnig Martin, Aŭstrio
3. Barkoviĉ Kreŝimir, Francio
4. De Weerd Stella, Belgio
5. Opulskiene Gražina, Litovio
6. *80J qnkpi gt 'Oczko kkkp. 'C utkq*
7. Prent Arturo Bernardo, Anglio
8. Keable Stan, Anglio
9. Beloŝević Marija, Kroatio
10. Hardy Roger, Francio
11. Heide Zora, Kroatio
12. Borčić Lucija, Kroatio
13. Plavšić Gordana, Kroatio
14. Svetličić Zdenka, Kroatio
15. Bakker-ten Hagen A.J., Nederlando
16. Hammarberg Jarl, Svedio
17. Stoilova Zlatka, Bulgario
18. Weiss Andre, Francio
19. Weiss Colette, Francio
20. Seiko Yamasaki, Japanio
21. Masseron Odile, Francio
22. Bustin Marteno, Hispanio
23. Chassard-Caubel Renata, Francio
24. Mazij Lija, Hispanio
25. Rooke Dieter, Svislando
26. Degoul Claudine, Francio

27. Degoul Francisko, Francio
28. Čović Boris, Kroatio
29. Rigault Louise, Francio
30. Rigault André, Francio
31. Toubale Franciska, Aŭstralio
32. Ericson Bengt, Svedio
33. Kostjuk Tamara, Ukrainio
34. Sabatier Tereza, Francio
35. Sabatier Regis, Francio
36. Simcock Vilĉjo, Britio
37. Akik Svijetlana, Kroatio
38. Vilette Suzanne, Francio
39. Dumont Charles, Francio
40. Kwantes-Kooij Corrie, Nederlando
41. Lynn Ronald, Britio
42. Kapista Terezija, Serbio kaj Montenegro
43. Stojković Slobodanka, Serbio kaj Montenegro
44. Hinšt Zlatko, Kroatio
45. Vukušić Marija, Kroatio
46. Orešković Štefica, Kroatio
47. Zjačić Mirjana, Kroatio
48. Damjanić Sanja, Kroatio
49. Brletić-Višnjić Roža, Kroatio
50. Špehar-Šantolić Anka, Kroatio
51. Zegnal Liza, Kroatio
52. Babić Marija, Kroatio
53. Wylleman Raymond, Belgio
54. Cardona Pierre, Francio

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la CD en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx = ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.


La Redakcio

ORIGINO DE LA 1-A DE MAJO FESTOTAGO EN FRANCIO

LA FESTO DE LABORO

1793, la 24-an de oktobro, en Francio, en sia raporto pri la kalendaro legata al la Konvencio, Fabre d'Eglantine kreas la Feston de Laboro, la 19an de septembro.

Saint-Just, en la Respublikanaj Institucioj, starigas la publikajn festojn ĉiun 1-an de la monato. La festo de Laboro estos la 1-an de pluvioso (20-an aŭ 31-an de januaro).



1848 la Konstitucio starigas la Feston de Laboro en la kolonioj por "forviŝi" la malnobligon kreitan per sklavigo, kaj ĝi estis fiksita je la dato de la 4-a de marto - la dato de abolo de sklaveco en Francio kaj en kolonioj.

En 1886, en Usono, Ĉikago, okazis ribeloj ĉar la laboristoj ne plu volis labori pli ol 8 horojn tage.

1889, la La Kongreso de la Socialista Internacio en Parizo adoptis la 1-an de majo kiel tagon de laboristaj postuloj. Laŭ la propono de Raymond Lavigne, la Kongreso decidis organizi internacian manifestacion je la fiksita dato, por ke ĉie la laboristoj postulu samtage la 8-horan labortagon. Estis elektita la 1-a de majo. American Federation of Labor jam adoptis ĝin.

1890, en Francio, en la flugfolioj invitantaj al manifestacio, la ideo de la "Festo de laboro" estis ofte ligita kun la postuloj de 8-hora labortago. Okazis gravaj manifestacioj en Parizo kaj en 138 urboj en Francio kaj en la mondo (Germanio, Aŭstrio-Hungario, Rumanio, Belgio, Nederlando, Italio, Polio, Hispanio, Britio, Svedio, Norvegio, Danio, Usono).

Pluraj naciaj kongresoj proponas renovigi tiujn manifestaciojn.

En 1891 okazas manifestacioj en diversaj landoj. En Francio, en la urbo Fourmies armeo mafas kontraŭ la homamaso: 10 mortintoj.

Kongreso de Socialista Internacio en Bruselo donas al 1-a de majo sian jaran kaj internacian karakteron. Ĝi okazos ĉiujare ekde la jaro 1892.

1906 en Francio, dum la 1-a de Majo okazis perfortaj manifestacioj postulantaj la 8-horan labortagon. En Parizo estis 800 arestitoj kaj multaj vunditoj.

1936 en Francio, Popola Fronto, grandega manifestacio.

1941, la 12-an de aprilo la leĝo proklamas la 1-an de Majo "Festo de Laboro kaj de la sociala Konkordo" (nelabora tago sen perdo de salajro, sed 50 % el ĝi estos verŝita al Nacia sekureco).

1947, la 29-an de aprilo: La 1-a de Majo estas deklarita tago pagita kaj nelabora (do oficiale en Francio ne ekzistas "Festo de laboro" sed nelabora tago).

Redakcio

SOCIALAJ RAJTOJ I

EN GERMANIO, ONI SENDAS SENLABORULINOJN AL BORDELO !

Kiam germana Laboragentejo «BA» proponas al vi «akcepteblan» laboron, oni estas devigata akcepti ĝin. Eĉ se, por tion fari, oni devas iri al bordelo (prostituejo)! Depost januaro 2005, longtempaj senlaboruloj estas devigataj akcepti ian ajn laboron aŭ ilia monsubteno estos nuligita. Sed, la profesio de prostituino estis leĝe rekonita en la jaro 2002. *öpkr'rci cu' pkclp'uqekwlp'nqvk'qlp'ne'l'f'q'gwu'u' pqt o crg'ng''qpk'rtqt w'f'g''rwdikne'l' ugt.xql÷* - substrekas la Germana federacio pri seksprofesio (BSD). Seksendustrio, en plena disvolviĝo, uzas nun servon de "BA" por novaj "laboristinoj": Pro la fakto ke tiu metio ne plu estas nelica, teorie oni povus devigi iun havigi siajn vivrimedojn per prostituado" - konfirmas Mechthild Garweg, advokatino specialigita en sociala juro. Ja, germanaj ĵurnaloj trovis plurajn kazojn de virinoj kiuj estis senditaj al "institucioj de ĉarmo". Oni ne scias ĉu la agentejo nuligis ilian subtenmonon pro la rifuzo de tiu "laboro".

L.R.



OKAZE DE 1-A DE MAJO
TAGO DE LABORISTAJ
LUKTOJ

BONDEZIRAS AL VI
LA REDAKCIO